Multaj kuponoj povas esti resenditaj samkoverte.
Laŭbezone bv. multobligi la kuponon.

Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176
NL-3015 BJ Rotterdam
Nederlando

1 "Respekti ĉiun vivon."

2 "Rifuzi perforton."

3 "Dividi kun aliaj."

4 "Aŭskulti por kompreni."

5 "Konservi la planedon."

6 "Remalkovri solidarecon."

Presita sur 100%-a reciklita papero.

Interreto : http://www.uea.org/2000.html

MANIFESTO 2000

Por kulturo
de paco
kaj senperforto

2000 INTERNACIA JARO
POR LA KULTURO DE PACO

MANIFESTO 2000

Paco en niaj manoj

Aliĝu al la internacia movado por la kulturo de paco kaj senperforto

- **Ĉar la jaro 2000 devas esti nova komenco, ŝanco por transformi – ĉiuj kune – la kulturon de milito kaj perforto en kulturon de paco kaj senperforto.**
- **Ĉar tiu transformado postulas partoprenon de ĉiu el ni kaj devas prezenti al gejunuloj kaj estontaj generacioj la valorojn, kiuj povas inspiri ilin krei mondon bazitan sur justeco, solidareco, libereco, digno, harmonio kaj prospero por ĉiuj.**
- **Ĉar la kulturo de paco povas fundamenti daŭripovan evoluon, protektadon de la medio kaj la bonfarton de ĉiu.**
- **Ĉar mi konscias pri mia parto de respondeco antaŭ la estonteco de la homaro, precipe antaŭ la hodiaŭaj kaj morgaŭaj infanoj.**

MI DEVONTIGAS MIN EN MIA ĈIUTAGA VIVO, MIA FAMILIO, MIA LABORO, MIA KOMUNUMO, MIA LANDO KAJ MIA REGIONO:

1 "Respekti ĉiun vivon." Respekti la vivon kaj la dignon de ĉiu homo sen diskriminacio aŭ antaŭjuĝoj.

2 "Rifuzi perforton." Praktiki aktivan senperforton, rifuzante perforton en ĉiuj ĝiaj formoj: fizika, seksa, psikologia, ekonomia kaj socia, precipe rilate al la plej malriĉaj kaj la plej vundeblaj kiel infanoj kaj adoleskuloj.

3 "Dividi kun aliaj." Kundividi miajn tempon kaj materiajn rimedojn, praktikante malavarecon por haltigi forpuŝadon, maljustecon kaj politikan kaj ekonomian subpremon.

4 "Aŭskulti por kompreni." Defendi la liberecon de esprimado kaj la kulturan diversecon, ĉiam preferante dialogi kaj aŭskulti, ne cedante je fanatikeco, mensogado kaj rifuzado de aliaj.

5 "Konservi la planedon." Favori respondecan konsumadon kaj evoluigon kiu respektas ĉiujn vivo-formojn kaj konservas la ekvilibron de la naturo sur nia planedo.

6 "Remalkovri solidarecon." Kontribui al la evoluo de mia komunumo, kun plena partopreno de virinoj kaj kun respekto de la demokratiaj principoj, por kune krei novajn formojn de solidareco.

Diskonigu la mesaĝon de Manifesto 2000

Subskribu MANIFESTON 2000 en Interreto: www.uea.org/2000.html

- Pro la grandega celo de tiu ĉi kampanjo – 100 milionoj da subskriboj – la uzo de Interreto estas forte rekomendata por disvastigi la Manifeston 2000 kaj por kolekti subskribojn.
- Se vi ne havas rektan aliron al Interreto, eble vi povos ligiĝi al ĝi ĉe viaj geamikoj, bibliotekoj, lernejoj, universitatoj, urbodomoj kaj ciberkafejoj, aŭ ĉe la plej proksima oficejo de UN.

Se vi vere ne havas iun ajn eblecon aliri Interreton, bv. plenigi, subskribi kaj resendi tiun ĉi kuponon.

Propra nomo* .....

Familia nomo .....

Naskiĝdato ..... Sekso: ☐ ina ☐ vira

Urb(et)o .....

Lando .....

Dato kaj subskribo .....

.....

* *Via nomo, kiel subskribinto de* MANIFESTO 2000, *aperos en la TTT-ejo dediĉita al tiu ĉi agado: http://www.unesco.org/manifesto2000*

La Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj proklamis la jaron 2000 la "Internacia Jaro por la Kulturo de Paco". Grupo da Nobel-pacpremiitoj projektis MANIFESTON 2000 okaze de la prifestado de la 50-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.

Ĉiuj subskriboj por MANIFESTO 2000 **estos prezentitaj al la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj en septembro 2000.**